# KATOLIKA SENTO



SPEDIZIONE
IN ABBONAMENTO POSTALE
GRUPPO IV

**KATOLIKA SENTO**
BOLLETTINO DELLA
**UNIONE ESPERANTISTI**
**CATTOLICI D'ITALIA**
**(U.E.C.I.)**
**Anno 50° - 1971**

Direttore Responsabile:
DON FERDINANDO LONGONI
Via S. Ambrogio 2
Telef. 99.60.050
20051 LIMBIATE (Mi)

Redattore:
P. GIACINTO JACOBITTI
Piazza Santa Maria Maggiore 8
Telef. 738.515
00185 ROMA

Presidente:
P. ALBINO CICCANTI OFM
Via S. Bernardino 26
47037 RIMINI (Fo)

Tesoriere:
DR. CARLO CESARE FERRARI
Viale dei Mille 37
Telef. 267.895
20129 MILANO

Segretario:
DR. FRANCO GALBUSERA
Via della Ghiacciaia 3
Telef. 045 - 22.062
37100 VERONA

Autorizzazione Tribunale
di Milano N. 6536 del 6.4.1964

KATOLIKA SENTO

50a jaro

N° 8 - Aŭgusto 1971

POR LA MALLONGA parolado al la fideluloj, kunvenintaj en la placo S.ta Petro, dimanĉon, la 11-an de julio, la papo elektis kiel temon la someran libertempon. Ĉar liaj vortoj ŝajnas al ni taŭgaj ankaŭ por ĉiuj niaj s-anoj, kiuj profitas la okazon por viziti eksterlandajn naciojn kaj kongresojn, aŭ tute simple por **ripozi**, ni volas dediĉi al ili la papajn vortojn, kiel bondeziron.

## En la silento de la naturo: Invito al meditado

"Ĉi tiu periodo, por la spirita vivo de la Eklezio kaj por la jam komuna kutimo de feriado, estas periodo de transiro.
Ĝi estus bone uzata, se ĝi estus dediĉata al la aŭskultado. Al la aŭskultado de la voĉoj, kiujn la bruego de la kutimaj okupoj malebligas kompreni kaj kiujn la bruoj de la tiel nomataj "amas-komunikiloj" kaj la hipnoto de la frivolaj laŭmodaj kanzonoj malfacile permesas al ni percepti. Ni estas eksterigitaj kaj malriĉigitaj je interna parolo fare de la surdiganta ĉirkaŭa kriado.
Se estas al ni konsentite ĝui iom da somera silento, ni klopodu aŭskulti antaŭ ĉio la voĉon de la naturo, kiun nia artefarita vivo igis preskaŭ nekomprenebla. La kosmo - ĉielo, tero, vivo kaj fenomenoj de la naturo - parolas al tiu, kiu kapablas aŭskulti, lingvaĵon, kiun nur la silento perceptas, kaj kiu, laŭŝajne facila kaj komprenebla por la sensoj, prezentiĝas poste plena da sekretoj, mistera, preskaŭ timiga: "La silento eterna de

la senfinaj spacoj min timigas" diras sentenco de fama pensulo (Pascal, 206). Sed por tiu, kiu bone aŭskul - tas, lingvaĵo metafizika, eĉ religia, tuj sugestas: "La ĉieloj rakontas la gloron de Dio" (Ps. 18,2); kaj same la aliaj scenoj de la mondo, kiu ekzistas kaj kiu per si mem evidentigas, ke ĝi ne havas en si kialon por ekzis ti. Ni refariĝu iom kontemplantoj kaj admirantoj de la mondo kreita kaj eltiru el ĉi tiu unua aŭskultado la ek iron al la poezio de la preĝado.
Krome, estas alia aŭskultado, kiu nin invitas, kaj ĝi estas tiu de la parolo de Dio, de la Sankta Skribo, de la Evangelio, kiun verŝajne ni kredas jam koni kaj kiu male, nin atendas por pli serioza kaj metoda dialogo . Alia sentenco memorinda precipe por ni kristanoj: "La nescio pri la Sanktaj Skriboj estas nescio pri Kristo" (S. Hieronimo, en Jes. Prof. - PL. 24, 17). Ĉu kel- kaj trankvilaj horoj de la ferioj ne estus dediĉendaj al ĉi tiu aŭskultado?
Kaj ekzistas tria voĉo, kiu meritas estis aŭskultata pli ol ni kutime faras, tiu de la konscienco, restinta por multaj personoj la unika instruisto de ilia konduto. Sed, ĉu ĝi estas vere aŭskultata? Kaj ĉu ĝi estas instruisto prilumata aŭ miopa kaj blinda? Ankaŭ ĝi devas aŭskul ti la internan Parolon de la vero!
Vidu, kia simfonio de voĉoj atendas nian atenton! Ni bondeziras al vi tempon kaj talenton por bone aŭskulti, kaj ke Maria, la plej altgrada aŭskultantino (Lk. 1,29; 2,19; 2,51; 11,28); instruu al ni ĉi tiun superan arton de la spirito."

ESPERO KATOLIKA aperigis en Julio la unuan nume- ron (4-5) de la nova redakcio. Ĉar ni atendis ĝin sen- pacience kaj scivoleme, ni salutis ĝoje, kaj avide ni tralegis ĝin. Kiel programa numero ni ne miras, ke ĝi

ŝajnas unuaspekte severa; ĝi ne povis montri tuj sian plej belan veston. Oni perceptas la prisilentitajn malfacilaĵojn de la abrupta redakcia aliiĝo. Krome foliumante la paĝojn, nin trafis ankaŭ diversaj pres- kaj lingv-eraroj. Ni estas komprenemaj : certe la sekvontaj numeroj pliboniĝos ĉiurilate. Tamen ĝi havas ankaŭ pozitivajn poentojn. Unue, ĝia klara programo, kiu ne volas allasi dubojn pri fideleco al la nova linio. La respondeca komisiono estas ĝia grava garantiaĵo. Plue, ek de la unua paĝo ĝi celebras Marian; ĉi tio jam certigas nin pri la ĝusta starto. Ankaŭ la tipografia aspekto ŝajnas al ni rimarkinda pliboniĝo kaj ŝatinda la varieco de la karakteroj, kompare al la rimedoj ne ĉiam feliĉaj de la pasintaj numeroj. Tre oportune la revuo donas la portreton de la nova prezidanto kaj lian alvokon. Ni opinias, ke la multaj, kiuj ĉagreniĝis pro la antaŭa sinteno, nun povas ĝoji kaj redoni sian plenan fidon al IKUE. Nu, se ili deziras belan revuon, ili ja scias, ke la plej rekta vojo estas havigi helpe al ĝi abonojn kaj bonajn artikolojn.

CENTRO ESPERANTISTA CATTOLICO ROMANO

N° 96

"GAUDETE IN DOMINO SEMPER" (Ĝoju en la Sinjoro ĉiam) estas frazo de S. Paŭlo, kiu ornamas la fasadon de vilao situanta en teritorio de Ragusa( Sicilio). La vilao apartenas al nia vigla samideano J. Stanislao Boscarino, kaj ĝi estis konstruigita antaŭ 80 jaroj de lia patro, estro de fervora katolika familio. En ĝi ripoze somerumas kun sia familio la nuna posedanto, figuro nobla, malavara kaj laborema, kiu dediĉis sian vivon al bonfara agado kaj, kun escepta entuziasmo, al

Esperanto. Tiu vilao kaj ĝia loĝanto inspiras al samideano L. Minnaja la poeziaĵon "Sicilia somero", kiun ni kun plezuro ĉi tie publikigas.

## SICILIA SOMERO

Someras jam, amiko Stanislao!
Animo via nun liberas ĝue
ĉe l' plaĉa ripozejo: la vilao
"En la Sinjoro ĝoju kontinue!"
Destino prava post labora vivo,
premio justa por noblec-aktivo.

Tagiĝas pompe, helas la kamparo;
la birdoj ĥorsalutas per pepado
l' aŭroron naskiĝantan el la maro;
leviĝas sun', vekiĝas la cikado.
La monto skue tondras en lontano:
l' inferan ventron vomas la vulkano.

Tagmezas: varmas la aer' senspira,
l' agava foliaro akre pika
kaj l' opuntio per branĉar' spalira
gardstaras heĝe laŭ baril' fortika.
Hedero grimpas al la mur' pasie
por haste kreski kaj formorti tie.

Vesperas: l' ombroj vestas la naturon,
invadas ĝin mistika pac-silento,
la luno tarde rompas la obskuron
per sia fantazia blankarĝento;
la najtingalo dolĉe melodias,
la tago malrapide agonias.

Kaj nokto: Sicilia nokt' somera;
for el la grundo grilo kantilene,
ritmataj de la skopsa kri' mistera,
la sonĝojn lulas de la dorm' serene.
L'agado ĉesis; ĉio jam senbrue:
"En la Sinjoro ĝoju kontinue!"

Luigi Minnaja

DIO ESTAS AMO (I.Joh.4:8)

Miaj karaj! En multaj miaj interparoloj kun la tiel nomataj ateistoj ofte mi estas ironie demandata: "Diru al mi, kio ververe estas Dio? Esprimu lin! Priskribu! Kiel vi povas fidi al iu, kiun vi tute ne konas, kiun vi eĉ ne povas koni, ĉar li ne ekzistas?"

"Pardonu! mi tuj respondas - mi lin bone konas kaj eĉ sufiĉe ofte renkontas". Konsterno en la okuloj de miaj disputantoj.

Nun mi ŝajne ŝanĝas la temon: "Ĉu vi kredas ekzisti amon - veran amon inter homoj? Ĉu vi ne vidis iam homon, kiu ĉion, eĉ sin mem, oferis por alia persono? Kompreneble, ĉiu iam vidis veran amon, precipe tiuj, kiuj travivis la militon, koncentrejon; tie ofte homo por homo libervole suferis kaj eĉ sian propran vivon donis por helpi al kunuloj. Do, kiam mi denove demandas: "Ĉu vi iam vidis amon?" tuj mi ricevas la tiom deziritan respondon: "Kelkfoje jes; jam ofte aŭ almenaŭ unu foje en mia vivo mi vidis veran amon".

Nun elpoŝigante la "Novan Testamenton" mi klarigas: "Do vi kredas Dion ekzisti, eĉ vi lin vidis!" kaj tuj mi montras al li la vortojn troveblaj en la titolo: "Dio estas amo".

Estas tamen alia flanko de la sama medalo. Ofte de

la kristanoj, kiuj sin almenaŭ deklaras tiaj, kaj ĝe-nerale ĉiudimanĉe frekventas la preĝejojn, mi povas aŭdi similajn skeptikajn vortojn: "Vera amo ne ek-zistas, regas nur trompo, mi ne kredas veran amon ekzisti, mi ĝin neniam vidis". Kiom oftaj estas tiaj pa-roloj inter ni kristanoj! Ĉu ankaŭ vi tiel pensas? Se jes, ne trompu vin. Vi ne estas vera kristano, vi ne kredas Kriston, ĉar nur kiu konas amon, tiu konas Di-on, kaj eĉ pli: "Kiu ne amas, tiu ne konas Dion, ĉar Dio estas Amo" (I Joh.4:8). Do , "vi amu ne laŭ vorto nek laŭ lango, sed laŭ faro kaj vero" (Joh.3:18)."Dio estas Amo, kaj kiu restas en Amo, tiu restas en Dio, kaj Dio restas en li!" (Joh.4:16).

Tiujn ĉi sanktajn vortojn forgesu neniam! Amen.

Andrzej Marszalkowski

Radio Roma - Esperanto. Aŭgusto 1971-a.
Dimanĉon la 1-an: Novaĵoj el Italujo; la 8-an : Prob-lemoj de edukado de landoj de Eŭropa Komuna Merka-to; la 15-an: Kanzonoj en Esperanto; la 22-an: Fiŝ-kaptado de tinusoj en Sicilio; la 29-an: Leterkesto.- La dua parto de ĉiu dissendo estas dediĉata al "Kuri-ero de Esperanto". La dissendoj okazas de h. 21.00 ĝis h. 21.20 (Mez-eŭropa tempo). Ondlongoj: m.30,90 - 41,24 - 25,42.

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

El Romo, centro de la katolika mondo, kelkaj informoj pri la vivo kaj agado de l' eklezio:

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

"SEDULA CURA" (Diligenta zorgo) titoliĝas la nova a-postola letero, per kiu Paŭlo VI reordigas la Biblian Komisionon, kiu estis starigita en la 1902-a de papo Leono XIII. Ankaŭ ĉi tiu reformo, kiel ĉiuj agadoj de

nia papo, moviĝas laŭ la impulso donita de la Dua Vatikana Koncilo, kiu volis, ke la senmezuraj riĉaĵoj de la dia vorto estu pli kaj pli metitaj sub disponon de la dia popolo. Dum ĉi tiu longa intervalo la bibliaj studoj intensiĝis kaj profundiĝis kaj postulis totalan revizion de la malnovaj statutoj. Fakte la dia vorto estas ne nur ne pre bazo de la teologio kaj de l' eklezio de Kristo, la spirita nutraĵo de la religia vivo, la mezuro de la konscienco en la individua kaj socia vivo, sed ankaŭ la pli nto sur kiu stariĝos ekumenismo, la monumenta verko de la Sankta Spirito en nia epoko. Sekve oni devas ĉiam klopodi por malkovri la kaŝitajn trezorojn de la Sanktaj Skriboj, sub la vigla gvidado de la Eklezio, ĉar al ĝi Dio komisiis ilin, ne al la privata juĝo de scienculoj. Pro tio Paŭlo VI memorigas en sia "Motu proprio", ke la dia vorto devas esti interpretita laŭ la normoj de la Tradicio. Fakte kvankam la Komisio estas aparta organismo de la eklezio, ĝi kunordiĝos kaj kunlaboros kun la kongregacio por la kredodoktrino, kies prefekto estos ankaŭ prezidanto de la nova biblia komisiono. Ĉi tiu estas la unika organismo, kiu povos doni devigajn normojn pri interpreto. Inter ĝiaj taskoj ne lasta estos klarigi el la dia vorto tion, kio povas esti komuna al ĉiuj kristanoj. Kaj en ĉi tiu sfero ĝi laboros kun la Sekretariato por la Unuigo de la kristanoj. La dudek membroj de la Komisiono estos elektitaj laŭ la indikoj de la Episkopaj Konferencoj, kiuj estas petataj proponi nomojn de kompetentaj personoj, ekleziuloj aŭ ankaŭ laikoj. Ankaŭ ne katolikaj fakuloj povos kunlabori, se ili tion faras kun katolika sento. Pritraktendaj temoj estos fiksitaj de la papo aŭ de la prezidanto; krom e ili povas esti proponitaj de episkopaj konferencoj, katolikaj universitatoj kaj bibliaj asocioj. Eĉ, inter la novaj celoj de la biblia komisiono, grave estos kontaktiĝi kun

bibliaj asocioj ankaŭ ne katolikaj, tiel ke tio, kio iam estis disiga motivo, povos ek de nun esti bazo de unuigo.

"FUNDAMENTA LEĜO" aŭ Statuto de la katolika Eklezio estis petita de multaj episkopoj jam de la Dua Vatikana Koncilo. Kaj prave. Fakte, ĉar la eklezio jam entenas ian plurismon, t.e. latinan kaj orientajn eklezioj n, kaj ĉar ĝi celas al ekumenismo, necesas scii, kio estas precize la katolika eklezio, kaj kia devas esti la komuna bazo de la eklezioj al ĝi kunigitaj. Oni jam faris tri redaktadojn de tiu statuto, korektante ĝin laŭ la ĉiufoje ricevitaj sugestoj. Oni volis, ke tiu statuto ne havu tro jurisman aspekton, sed ke ĝi donu la teologiajn principojn, kiuj estas bazo de la Eklezio, korpo de Kristo kaj sankta. La Fundamenta Leĝo, kies projekton oni disdonis al la tuta episkoparo, por ke ĉiu pristudu ĝin kun sia klero kaj laŭeble kun la dia popolo, havos kelkajn principojn el la dia juro, komprenebl e ne ŝanĝeblajn, sed ankaŭ aliajn, devenantajn de la tradicio, do ŝanĝeblajn. La respondoj de la episkopoj, ebligos enprofundigon de tiu grava dokumento. Sed la lasta formo, verŝajne postulos ankoraŭ kelkajn jarojn. Dume ne mankas kelkaj opoziciantoj, inter kiuj kard. Suenens.

TEMO DE LA KVINA TUTMONDA TAGO por la Paco. (1-an de januaro 1972) estos: "Si vis pacon, klopodu por justeco". Anoncis tion per preskonferenco Mons. Torrella, Vicprezidanto de la papa komisiono "Justeco kaj Paco". Li klarigis, ke la temoj estas ĉiujare de la papo elektitaj el grupo proponita de komisiono "Justeco kaj Paco". Intence oni anoncas anticipe la temon, por prepari la publikan opinion. Kaj la pritraktado de la temo daŭros tutan jaron, dum en ĉiu ŝtato

oni enkondukos diversajn iniciatojn por ĝia konkreta apliko. Studofontoj krom la dia vorto: "Frukto de justeco estas paco (Is. 32:17) estas nun multaj papaj instruoj, kiel tiuj en Ĝenevo kaj en Kampala; apostolaj dokumentoj, kiel "Oktogesima Adveniens" en kiu sesfoje la papo parolas pri la temo de la paco. Krome "Pacem in terris" kaj "Gaudium et spes". Cetere tiu temo koincidos ankaŭ kun tiu pri "Justeco en la mondo", kiun prezentos la Sinodo, kiel rezulton de proponoj kaj diskutoj faritaj en la diocezaj, regionaj kaj naciaj episkopaj konferencoj... Paco, konkludis mons. Torrella, ne estas nur io negativa, malĉeesto de milito, aŭ stabila ekvilibro inter kontraŭaj fortoj, ordo ĉiukoste, ordo ekstera kaj ŝajna. Sed estas io pozitiva: frukto de justeco, kiu postulas daŭran klopodon, konstruaĵo konstante starigenda, streĉa luktado kontraŭ egoismo je ĉiu nivelo: persona, kolektiva, nacia, kontinenta.

NOVA AŬDIENC-SALONO estis inaŭgurita de la papo la 30-an de junio apud la baziliko S. Petro (vidu foton p. 12-13). Tiel estis ankaŭ inde celebrita la oka datreveno de la kronigo de la papo. Intence li ne volis oficialan, sed nur "familiaran" inaŭguron; samkiel en la impona - oni diras, ke ĝi estas la plej vasta en Europo - konstruaĵo li nenion volis monumenta aŭ vane ornama. Tamen la elspezoj, antaŭviditaj rimarkinde altaj, fakte dum la konstruado kreskis multe pli ol la kalkuloj faritaj, pro la neceso fortikigi la ne sufiĉe solidan terenon. Sed la papo volis tiun salonon por respondi al la postuloj de la pli kaj pli grandaj pilgrimantaj amasoj, kiuj petas lin viziti kaj aŭskulti rekte de li la dian vorton, kaj respekte al la kategorioj, eĉ la plej humilaj de la dia popolo. Enirante, la papo pasis piede tra la longa vico da pilgrimantoj, ĝis la podio. Ambaŭflanke de tio jam troviĝis kvarcent laboristoj, kiuj

konstruis la aŭlon. Ĉar li volis danki al ĉiuj, kiuj partoprenis en la mirinda konstruaĵo, kaj aparte al inĝ. Pier Luigi Nervi, kiun li alvokis al si kaj longe ĉirkaŭbrakumis inter la aplaŭdoj de la ĉeestantaro. La mondfama arkitekto fakte solvis feliĉe ĉiujn problemojn pro la escepta vasteco: ses mil kvadratajn metrojn; pro la maksimuma enhaveco rilate al la disponebla tereno: ĝi kapablas ricevi ses mil sidlokojn aŭ dek du mil starantajn personojn; kaj samtempe por facileco kaj rapideco de aliro; por videbleco de la papa podio el ĉiu punkto; por la perfekta akustiko. Krome li devis krei duan malpligrandan salonon por apartaj aŭdiencoj; alian por kongresoj, Sinodoj, ks. Ĉiuj ekipitaj per la servoj de presaro, radio kaj televido, kaj per la plej modernaj rimedoj pri lumo, aerumado, ktp. En tiu okazo la papo anoncis, ke samtempe li volis krei malgrandan sed indan kvartalon en Romo por cent enbarakiĝintoj kun la elspezoj de 550 milionoj da liroj, vendante palacon, kiun la S.Seĝo posedas en la centro de la ĉefurbo.

LA KOLEGIO "Sankta Hieronimo de la Ilirioj", roma restadejo de la junaj kroataj sacerdotoj, kiuj perfektigas siajn studojn ĉe la romaj universitatoj, estis insignita de Paŭlo VI per la titolo "Papa", kaj ekde nun ĝi nomiĝos "Papa Kroata Kolegio de Sankta Hieronimo". Tion deklaras en letero adresita al la kardinalo-protektanto de la instituto, Paŭlo Marella, la Ŝtata Sekretario kard. Johano Villot. En la dokumento estas resumita la glorplena historio de la kolegio, kies komenco devenas de la "Gastejo-malsanulejo por kroataj pilgrimantoj", fondita en Romo de papo Nikolao V en 1453, poste aliiĝinta al ekleziula kolegio en 1790 kaj al la aktuala celo de Leono XIII en 1901.

"KRISTANOJ BUDDISTOJ" estas la titolo de studaĵo en du volumoj publikita de la Sekretariato por la nekristanoj, cele helpi al tiuj, kiuj sin dediĉas al dialogo kun la kredantoj de tiu konfesio. La unua volumo prezentas historian kaj doktrinan enkondukon por la kono de buddismo, verkitan de mons. Etienne Lamotte, kaj eseon de Davido Snellgrove pri tibeta tantrismo. La dua komenciĝas per eseo de jezuito p. Masson pri buddismo ĝis nun kaj pri ĝia disvastiĝo ekster Hindujo. Sekvas konsiloj pri dialogo, de Pierre Humbertclaude, sekretario de la Sekretariato por ne-kristanoj.

FRATINO DIREKTANTA oficon en la Sankta Kongregacio por religiuloj kaj por sekularaj institutoj, estis la unuan fojon komisiita en la roma kurio. Ŝi estas Tadea Kelly; naskiĝis en 1917 kaj eniris la instituton de fratinoj de la Maria Prezentado en S.-Francisko je la 1937-a. Nun ŝi direktas la oficon por konstitucioj de virinaj institutoj. En ĉi tiu tasko ŝi povos profiti la spertojn ricevitajn dum la lasta sesio de la Koncilo, kiam ŝi laboris kun ekipo da amerikaj fratinoj pri temoj rilatantaj la modernan mondon. Ŝi estis ankaŭ ĝenerala asistanto en sia instituto ĝis 1970. Kaj antaŭe ŝi estis loka superulino kaj instruis la francan lingvon, pri kio diplomiĝis en la "Katolika Amerika Universitato" en Vaŝingtono.

1500 VIRINOJ PARTOPRENANTAJ en la naŭa kongreso de "Soroptimist international association" okaze de la 50-a datreveno de la fondo de la movado, estis ricevitaj de Paŭlo VI. La asocio havas ĉirkaŭ kvin mil membrinojn el kvardek kvin ŝtatoj. Salutante ilin, la papo laŭdis ilian noblan celon, kiu, kvankam ili apartenas al diversaj religiaj konfesioj, tamen ilin kunigas en la klopodo altigi morale kaj profesie virinon en la



La nova salono por aŭdiencoj de la papo. Ark. Pier Luigi Nervi.

socio. "La nuna tempo postulas urĝe vian kunlaboron - diris la papo - .Ĉar la eklezio neniam ĉesis prilumi la virinan noblecon, deklari ŝian fundamentan rajton egalan al la viro, agnoskante tamen la diferencojn necesajn al ŝia specifa misio, ankaŭ ni ĉiam simpatie sekvos viajn klopodojn por igi pli efika kaj taŭga la funkcion, kiu apartenas hodiaŭ al virino en la socio".

LA 1-a NACIA KUNSIDO por la kristana spirita kaj materia asisto de maljunuloj, iniciate de OARI ( Agado por la religia asisto de malsanuloj) fermiĝis la 4-an de junio en Rimini. Ĉi tiu entrepreno, jam nun dekjara, eldonas monatan bultenon "Renkonte al la suferanto" en 52 mil ekzempleroj, kaj revuon "Animoj kaj korpoj", por kunlaboro inter kuracistoj kaj sacerdotoj, ambaŭ itallingvajn. Ĉiujare pli ol 500 el ĝiaj membroj partoprenas en fakaj kongresoj. La unua tutnacia kunsido en Rimini vidis 300 inter kapelanoj kaj fratinoj, kuracistoj kaj maljunuloj, junaj flegistoj kaj flegistinoj. Pli kaj pli grava fariĝas ĉi tiu tasko, ĉar la nombro de la maljunuloj emas kreski: en 1971 en Italujo pli ol ok milionoj da personoj estas pli ol ses dekjaraj. Naŭ studogrupoj klopodis konkretigi en la realo de la ĉiutaga vivo la konkludojn de la fruktoriĉa kunveno.

MALABUNDO DE REGULARA KLERO oni konstatas inter la dioceza aŭtoktona sacerdotaro. La inter-

nacia presagentejo Fides komunikas, ke kontraŭ dek mil aŭtoktonaj sacerdotoj de la Negra Afriko nur 200 estis regularaj. Tamen ĉiam aktuala estas la valoro de la konsekrita kaj ankaŭ de la kontempla vivo por la misia agado. La Dua Vatikana Koncilo ambaŭ laŭdegis kaj invitis la religiajn institutojn fondi siajn domojn en misilandoj. Pri la virina dikonsekrita familio ŝajnas, ke tiu danĝero ne estas grava. La klaraninaj domoj en Afriko estas 13, en Egiptujo, Alĝerio, Maroko, Centrafriko, Burundo, Malavio, Ugando, Kongo, Tanzanio, Zambio, Madagaskaro kaj Kameruno. Sed ankaŭ sufiĉe nombraj estas karmelaninoj kaj benediktaninoj. Kaj ekĝermas jam kelkaj aŭtoktonaj formoj. Malpli nombraj estas dominikaninoj kaj kapucenaninoj. Ankaŭ en Azio (Borneo, Tajlando) troviĝas en misiaj teritorioj kelkaj monakinejoj, kiuj donas konkretajn helpojn per siaj preĝoj, ekzemploj, evangelia agado. Ili komenciĝis helpe de reliĝiulinoj el Eŭropo, sed iom post iom ili altiris multajn indiĝenajn junulinojn. Ĉiuj respondas al la invito de Jesuo: "La rikolto estas abunda, sed malmultaj estas la rikoltistoj: preĝu, do, la Sinjoron de la rikolto, ke li sendu laborantojn en sian kampon".

DUM DEKJARA APOSTOLADO inter la Kabindoj de Angolo, misiisto P.José Martins Vaz skribis 4 librojn kun valoraj studoj pri etnografio, lingvo, literaturo, karaktero, religio, krizoj de tiu afrika popolo. Li scikapablis kolekti grandnombre rakontojn, proverbojn, fabelojn, kun verva kaj agrabla stilo. Liaj verkoj estas fundamentaj por ĉiu, kiu volas koni tiun landon kaj ĝian popolon, kun ĝiaj kutimoj, arto, kaj simpla filozofio. Tio estas unu el la sennombraj ekzemploj, kiu montras, kiel misiistoj sin dediĉas per ĉiuj siaj talentoj al la evangelizado.

EN LA 1943-a post internigo de la misiistoj laborantaj en Neghelli (Etiopio), ŝajnas ke la ĉeesto de PIME (la papa instituto por eksterlandaj misioj) ĉesis. Sed tuj kiam konkludiĝis la konflikto, ĉe la ekstrema okcidenta parto de la Afrika kontinento malfermiĝis por la instituto nova misio en la portugala Gvineo. La unuaj sep misiistoj, gvidataj de p. Biasutti, alvenis al Gvineo en majo 1947 kaj starigis en Bafatá, interne, apud rivero Geba, sian unuan bazon. Post prepara periodo ili fondis du disvastigajn centrojn en Catió kaj Farim. Unue la tuta teritorio estis komisiita al la portugalaj franciskanoj en la unika apostola prefektejo de Bissau. Aldoniĝis poste ankaŭ misiistoj de PIME. Kaj en 1952 la centroj pliiĝis: norde, en Suzana; ĉe la insuloj Bijagos, en Bubaque; interne, en Bambadinca. Bafatà restis centro de la misilando.

LA ANTAŬTAGON DE la Palma Dimanĉo per la solena konsekro de nova preĝejo, Nairobi, en Kenjo, riĉiĝis je nova katolika templo, dediĉita al la Dipatrino "La Konsolita". Tie fakte laboras de 70 jaroj la pormisia Instituto "La Konsolita" de Torino, kaj kunprojektanto de la templo estas pastro Mario Fiameni de la sama instituto. Kiom oportuna estis tiu nova preĝejo montris la miloj da fideluloj el ĉiu raso kaj nacio, kiuj partoprenis la inaŭguron. La nova preĝejo estos ankaŭ paroko kaj havos inter siaj fideluloj personojn el dekkvino da nacioj: vera kaleidoskopo da landoj kaj rasoj kiujn kunigas la sama kredo kaj amo al la patrino de Dio. Pro sia belega arkitekturo la templo aldonas novan prestiĝon al la ĉefurbo de Kenjo, kiu estas sendube unu el la plej belaj urboj de Afriko.

EN UGANDO la misia agado, kvankam sufiĉe bone organizita, estas ankoraŭ tre malproksima de la solvo de ĉiuj postuloj de la lando. La Kombonanaj misiistoj laboras tie en 7 diocezoj el la 12 de Ugando kaj ankaŭ en kelkaj entreprenoj, kiuj koncernas tutnacian karakteron, kiel la seminarioj de Gaba kaj Katigondo. La teritorio komisiita al ilia laboro mezuras 76.034 kv.kilometrojn, kun ĉirkaŭ 2 milionoj da loĝantoj, el kiuj unu miliono estas katolikoj, kaj duonmiliono paganoj. La kombonanaj sacerdotoj tie laborantaj estas 236, helpataj de 36 aŭtoktonaj kaj de 88 laikaj kunlaborantoj. Tamen kvindeko inter ili ĉiam ordinare forestas pro sanstataj motivoj aŭ pro diversaj laborvicoj. Kvardeko da pastroj estas pli ol 55-jaraĝaj; dum nur dudeko havas mal pli ol 35 jarojn. Trideko da sacerdotoj laboras pri diocezaj taskoj (seminarioj, lernejoj, hospitaloj). Kelkaj entreprenoj (lernejoj, ktp.) estis komisiitaj al laikaj personoj, sed tio ne ĉiam eblas, pro nesufiĉo da fakuloj. La sacerdotoj, kiuj havas senperan apostolagadon estas malpli ol 200. Memorigante la duonmilionan loĝantaron, ni vidas, ke meznombre troviĝas unu pastro por 10.000 loĝantoj! Oni devas ankaŭ konsideri la rimarkindajn malhelpojn, devenantajn de la diserigo de la loĝantaro, kiu ne koncentriĝas en grandaj vilaĝoj aŭ urboj, dum ili estas kunligitaj nur per vojetoj kaj irejoj.

POR PARTOPRENI en la asembleo de PIME (Papa Instituto por Misioj Eksterlandaj) alvenis al Romo ankaŭ mons. Arcangelo Serqua, kiu de dudek jaroj laboras en Brazilo. Intervjuite, li volonte parolis pri sia misio. Temas pri Parintins, (17 mil loĝantoj), la dua urbo de la rivero Amazono (la unua estas Manaus). La misio estas 90 mil kv. km-ojn vasta, kun 92.000 loĝantoj. La

nomo de la rivero estis donita le Orellana, leŭtenanto de esploristo Pizzarro, kiu vidinte laŭlonge de la bordoj fortikajn longharajn homojn, opiniis, ke ili estas virinoj. Je la alveno de la misiistoj, antaŭ dudek jaroj troviĝis en la urbo unu nura lernejo. La misiistoj anstataŭ tuj provizi por si mem la domon, volis konstrui novajn elementajn lernejojn, krome liceon, kaj instruistan kaj administran lernejojn. Kiel ili povis starigi tiom da novaj konstruaĵoj ? Ilia unua celo estis krei brikejon; kaj el tiu fabriko, direktita de religiulo, elvenis ĉiuj brikoj necesaj por lernejoj, seminario, preĝejoj, domoj kaj ankaŭ por radielsenda konstruaĵo. Ĉi tiu fariĝis tre valora por la misia agado. Baldaŭ la loĝantaro povis facile aĉeti malgrandajn transistorajn ricevilojn, kaj tiel ĉiuj estis kunigitaj kiel granda unika familio, des pli, ke tiu radio estas la unika ricevebla en tiu vasta zono! Nun laboras tage kaj nokte por elsendoj 15 personoj sub la gvidado de sperta raditeknikisto. La radio transsendas regulajn kronikojn, religiajn programojn; krome informojn pri scienco, agrikulturo, higieno, ktp. kaj kompreneble, muzikon. La komuno prizorgas ankaŭ propran ĵurnalon. Ĉiujare viroj havas spiritan retiriĝon dum karnavalo: centoj da barkoj alvenas al la centro de la misio. Ankaŭ virinoj havas siajn retiriĝojn. Kaj tiam la viroj pretigas por ili la tiucelajn kabanojn kaj plenumas ĉiujn taskojn, ankaŭ kuiradon, por servi al la virinoj. Dum la sesmonata pluvsezono la lando fariĝas senlima marĉejo, labirinto da lagoj: kaj la akvoj superas 10 metrojn je alto. Kiam la pluvegoj ĉesiĝas, ankaŭ la akvoj defluas; la loĝantaro reprenas siajn laborojn sur la kampoj kaj la brikejo sian produktadon. Sed la misiistoj ne atendas tion, ĉar per motorbarkoj, naĝantaj dometoj kun kapeleto - unu aŭ du por ĉiu paroko -

ili senĉese vizitas eĉ la plej forajn fidelulojn.

EN KOLOMBIO la klopodoj jam de kelka tempo efektivigitaj de la episkoparo por doni pli efikan organizadon al la movado por la misioj, komencas doni fruktojn Interalie, por kunligi la multajn agadojn diocezajn, oni starigis misiajn komitajojn, estritajn de episkopo aŭ de misiisto, kiuj organizos studkunvenojn kaj apostolan formedon de seminarianoj; oni starigis administran konsilion kaj ekipon da vokiĝcelantoj; novan impulson al revuo "Misiones", antaŭe eldonita nur de misiistoj de Yarumal, ekde ĉi tiu jaro fariĝinta oficiala organo de la Kolombiaj misiistaj organizadoj. La unua numero, pretigita fare de tri misiistaj institutoj: Yarumal, La Konsolita kaj Misiistinoj de la Malgranda Sankta Teresa, aperis en 20.000 ekzempleroj, kaj tuj vekis grandan intereson en la publiko. Oni opinias, ke ĉi tiuj unuaj rezultoj certe donos pli grandajn fruktojn pro la klimato de frateco, dialogo, reciproka fido ekzistanta en la Kolombia eklezio.

EN BOGOTA (Kolombio) okazis antaŭnelonge unu el la plej interesaj ekumenaj travivaĵoj de la Latina Ameriko: dialogo inter katolikaj kaj anglikanaj episkopoj. Partoprenis en la renkontiĝo dek episkopoj ambaŭflanke. Oni ekzamenis la aspektojn de la malrapida irado de ekumenismo, kaj oni konstatis la grandajn avantaĝojn de tiu unua renkontiĝo, kio ebligis interŝanĝon de spertoj kaj amikecan etoson. Oni konkrete pristudis kelkajn temojn laŭ kvar sekcioj: 1. La Sankta Skribo: 2. Rilatoj inter Anglikanoj kaj Romkatolikoj en la Latina Ameriko; 3. Aŭtoritato; animzorgo; sakramentoj; 4. Reciproka kunlaboro en la misio laŭ la inspiro de la propraj spiritaj riĉaĵoj. Tiel oni pritraktis ankaŭ la paŝtistajn temojn de miksedziĝoj, de komunaj kultlokoj

de novaj altnivelaj renkontiĝoj. La konkluda raporto anstataŭ esti publikita, estis sendita al la superaj kompetentaj aŭtoritatoj. La anglikana episkopo Benson deklaris: Dum la dialogoj, ni ne volis kaŝi la problemojn kaj la diverĝojn inter la du komunoj. Ni lojale agnoskis, ke ĉe kelkaj punktoj ni ne akordiĝas perfekte. Sed post serioza ekzameno de la diverĝoj, ni konstatis pli grandan akordon ol oni povis opinii. Oni ja ne povas antaŭvidi rapidan kunigon de la eklezioj... Tamen oni jam perceptas, ke spirita unueco kaj kristana akordo ne estas malebla".

DU ĈILIAJ EPISKOPOJ, mon . Aritztia, helpepiskopo de Santiago, kaj mons. Gonzales, ĉefepiskopo de Talca, vizitis Kubon. Revenante de sia vojaĝo, ili deklaris, ke la Kubanoj, kvankam estas malriĉaj, ne estas en mizero; kaj kvankam ekzistas malabundo de vivrimedoj, tamen ilia vivnivelo ĝenerale estas digna. Ili ankaŭ prijuĝis, ke la kristanoj en Kubo ne devus esti fremdaj al la movado, kiu celas kontrui la "novan socion", esprimante nur malkonsenton. Kaj pri la sinteno de la reĝimo al la kredantaro, la du ĉiliaj episkopoj diris, ke, kvankam oni emas pritaksi ilin duarangaj civitanoj, pli kaj pli nombraj estas tiuj, kiuj entute sin dediĉas por la celoj de la revolucio.

NOVA APOSTOLCELA radistacio estis inaŭgurita la 1-an de julio en Sankta-Francisko de Usono. Ĉiokaze oni volis reliefigi, ke la kristana usona radio en Usono zorgas por religitemaj programoj, kiuj estas elsenditaj por la italaj enmigrintoj. La kristana radi-apostolado okupiĝas ankaŭ pri asistaj agadoj, pri kiuj sin dediĉas franciskana komuno. La nova apostola entrepreno estis enkondukita de p.Efzem Trettel kiu, alveninte al Sankta-Francisko por misiado inter enmigrin

toj, rimarkis, ke la radio estas la unika ebleco por kontaktiĝi ĉiusemajne kun la multaj italaj familioj translokitaj en Nord-Amerikon.

ANKORAŬ 40 MIL DOLAROJ estis transdonitaj de la Itala Episkopa Konfereco al la nacia sekretario de "Amikeco por Hindujo" en Novdelo, komisiita de la hinda episkoparo organizi kaj kunordigi la tutmondajn helpojn por la rifuĝintoj de la orienta Pakistano. Fakte la drameca situacio de preskaŭ ses milionoj da fuĝintoj el Pakistano al Bengalo (Hindujo), kaŭzita de la milito, kun la postsekvoj de malabundo da nutraĵoj, de higienaj servoj, da vestoj kaj domoj, kaj nun eĉ de ĥolero, daŭras. Patrino Teresa, antaŭnelonge insignita de la papo per la premio "Johano XXIII", streĉas siajn fortojn kaj tiujn de sia organizo, por la helpo al tiuj malfeliĉuloj. Mons.Joseph J.Harnett, direktoro de la Helpa Servo de la Usona Katolika Konferenco, flugis el Kalkuto al Novjorko por aranĝi helpojn. La unuan de julio li revenis kun du aviadiloj, luitaj de la "Katolikaj Helpaj Servoj" transportante 38 tunojn da nutraĵoj. De Novzelanda Societo, li ricevis, 11 mil usonajn dolarojn, kaj 15 mil anglajn sterlingojn de alia societo. El Germanujo estis sendita aviadile granda kvanto da nutraĵoj kaj 200.000 vakcinajn dozojn; 60.000 el Usono, 100.000 el la franca "Katolika helpo". La germanaj episkopoj jam kolektis 500.000 markojn (ĉ. 88 milionojn da italaj liroj). Intertempe la musono jam komenciĝis. Oni scias, kio ĝi estas: du aŭ tri foje en la sama tago elverŝiĝas el la ĉielo akvofalegoj, similaj al kaskadegoj, kiuj superakvigas ĉion, stratojn, vilaĝojn, urbojn. En ĉi tiu malaria marĉo du milionoj, eble tri da elmigrintoj kamploĝintaj laŭ nehomaj kondiĉoj, devas esti nutrataj de

la hinda registaro, kiu eĉ ne sukcesas sufiĉe nutri si ajn loĝantojn.

LA UNUIGA FUNKCIO de la Roma episkopo estis proklamita de frato Roger Schutz, prioro de la komuno de Taizé, okaze de lia interveno en kongreso de intelektuloj kaj de katolikaj studentoj en Friburgo. Aparte interesa estas ĉi tiu deklaro, ĉar, kiel sciite, tiu religia komuno estas tre simpatianta al la katolika eklezio, sed ne precize katolika. "Oni devas venki la konspiron de silento pri la rolo de la roma pontifiko - li diris - konspiro kiu estas apogita eĉ de kelkaj katolikaj grupoj, kvankam papeco estas esenca al ekumenismo. Unueco ne estas celo por si mem, sed por kredebligi la kristanan komunon". Pri la ekleziaj institucioj, li diris, ke oni povas ankaŭ dubi pri kelkaj institucioj, sed ne pri la institucioj tute simple... Kiu povus aserti, ke iu signo estas des pli vera ju pli malmulte videbla? Kaj ĉu oni povus imagi, ke nur malgrandaj eklezioj povas disradii la evangelion? Institucio estas io necesa, kiel vestoj, kiel lingvo! Kaj pri la Roma Pontifiko li diris: Kiamaniere estus eble priserĉi la unuecon de la eklezio kiel centro de renkontiĝo kaj komunio sen la roma episkopo? Se ĉiu loka komuno postulas paŝtiston, se ĉiu loka eklezio episkopon, kiel oni povas pensi pri eklezio reveninta al sia unueco sen universala paŝtisto? ... La katolika eklezio neniam povos sindeteni de la papa institucio. Rifuzi ĉi tiun neŝanĝeblan konvinkon de la katolika eklezio, signifus resti tre malproksime, sen voĉo en la dialogo por petegi, admoni, atingi la limojn de la mondo, se necese... Tion faras ĉi tiu paŝtisto, la Roma episkopo. El malgranda libera lando, la Vatikano, per la nura armilo de la evangelia libereco, la papo, servanto de la

servantoj de Dio, tre efikas por konsciigi la homojn pri maljusteco kaj subpremadoj. Sen li, kiu povus esprimi la unuanimecon de la kristanaro dum la teru raj minacoj kontraŭ la homaro?

KARD. VILLOT, Ŝtata Sekretario, skribis en nome de la papo al Alain Barrère, prezidanto de la Francaj Sociaj Semajnoj, okaze de la 58-a kunsido en Rennes, por ke oni klopodu favore al naskiĝo de nova socio. Temo de la sesio estis: "Kontraŭdiroj kaj konfliktoj: ĉu ili estas kondiĉo de la naskiĝo de nova socio"? Akcentante la brulantan aktualecon de la temo, la purpurulo admonas, ke ne nur oni ne devas subtaksi la realon de la diversaj konfliktoj, sed oni devas tre bone koni ilin por alfronti ilin pli efike. Li memorigis, ke ne mankas instruoj de la Koncilo kaj de la eklezio pri tio, kaj ke oni devas batali kontraŭ peko, radiko de ĉiu disiĝo, kaj esti emaj al dialogo. Unu el la plej karakterizaj niatempaj konfliktoj estas tiu ekzistanta inter la diversaj generacioj: inter adultoj kaj junuloj. Oni zorgu, ke dum la unuaj invitas la junulojn al pli granda realismo, samtempe ili ankaŭ malfermiĝu al tiu espero de la socia renoviĝo, celita de la novaj generacioj. "Ni ĉiuj estas alvokitaj, - konkludas la kardinalo - al pacienca kaj malfacila laboro por helpi la suferplenan naskiĝon de socio, kiu priserĉas kvazaŭ palpe sian vojon inter kontraŭdiroj kaj konfliktoj".

218 FRANCAJ JURISTOJ lanĉis alvokon al la publika opinio kaj al Parlamento, per kiu oni esprimas netan rifuzon al leĝpropono pri legalizo de aborto. Inter la subskribintoj estas universitataj profesoroj, membroj de ŝtatkonsilio, juĝistoj de la kontaj kaj ka

saciaj kortumoj, juristoj kaj advokatoj, kiuj aliĝis al la invito de la Juristar-Asocio por la respekto de la vivo. En la alvoko oni interalie deklaras, ke oni povas kun absoluta certeco aserti, ke la homa ekzisto komenciĝas ekde koncipiĝo. Pro tio ĉiu ajn aborto estas krimo, kiu trafas sendefendan senkulpulon. Konsenti do al leĝa mortigrajto nenio alia estus ol rifuzi unu el la ekzistorajtoj de juro: protektadon de malfortuloj. La juristoj, aŭtoroj kaj gardantoj de juro, petas de la parlamentanoj, kiuj estas en komisiono ekzamenonta la leĝproponon, ke ili rifuzu tiujn proponojn, kaj admonas la publikan opinion, ne pasive akcepti la trouzon de propagando fondita sur egoismo kaj senrespondeco. La asocio alvokas samtempe la atenton de la publikaj aŭtoritatoj, por ke ili decidu tiujn sociajn kaj ekonomiajn rimedojn, kiuj helpu al la suferoj de apartaj patriniĝoj.

LA SESA "Eŭropa Interparolo pri Parokoj" malfermiĝis en Strasburgo (Francujo) la 5-an de julio per parolado de la urba episkopo, mons. Arturo Elchinger. Temo de la renkontiĝo estis: "Kredeblecokaj akceptebleco de la nuntempa eklezio; evangelia kaj profeta funkciado de la nuntempa paroko". La episkopo memorigis, ke oni devas nepre kalkuli pri la laikoj, kvankam ili ne ĉeestas, ĉar ili estas profunde kuninteresitaj en la temo. Partoprenis ĉirkaŭ 300 reprezentantoj de 15 eŭropaj ŝtatoj, kun kard. Franz Koenig, ĉefep. de Vieno kaj diversaj eŭropaj episkopoj. Ĉeestis ankaŭ kelkaj protestantaj pastoroj, kaj unu el ili parolis ankaŭ ĉe la fermo de la kunsido. Ĉi tiuj interparoladoj komenciĝis ĉe Losano en 1961, iniciate de kanoniko Francisko Connan, nun parokestro de Sankta Roko en Parizo.

LA FEDERACIA ADMINISTRA tribunalo en Bavarujo rifuzis peton celanta forigon de krucifiksoj en la bavaraj tribunaloj. La ĵurnalo "Sueddeutsche zeitung", el Munkeno, komentis la decidon, memorigante, ke la peto enkondukita de "liber-religia komuno" asertis, ke la ĉeesto de la krucoj minacas la prijuĝan neŭtralecon. La ĵurnalo rimarkigas, ke "la federacia administra tribunalo deklaras interalie en sia sentenco, ke ĉi tiu popola protesto ne estas akceptebla ĉar la regiona komuno protestas por siaj membroj" ne kristanaj" Fakte oni havas validan popolan proteston kiam oni demonstras, ke oni estis endanĝerigitaj en propraj personaj rajtoj de iu administra akto, sed ne kiam oni protestas por anonima grupo". La peticioj estis jam rifuzitaj en la du unuaj instancoj.

PRESKAŬ MIL PROJEKTOJ, kun elspezo de ĉirkaŭ du miliardoj kaj duono da liroj, estis aprobitaj de "Adveniat", la germana katolika organizo por asisto al la Latina Ameriko. Tion komunikis mons. Franz Hengsbach, episkopo de Essen, kiu estras la episkopan komisionon por aprobo de la elspezoj necesaj por la iniciatoj. En la ekzameno de la projektoj oni preferis tiujn, kiuj favoras memevoluon, tio estas la progreson de la tuta komuno, kaj la favorantajn al malriĉuloj de urbo aŭ de kamparo. Triono de la projektoj ĵus aprobitaj estos efektivigitaj en Brazilo; aliaj 114 en Argentino, 62 en Ĉilio, 51 en Peruo kaj 49 en Meksiko.

ooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

ABONO: £. 1.000 (Us.dol. 1,60)
Poŝtĝirkonto 3-7791 al: D.ro C.C.Ferrari
(aŭ) pĝk. 1-37638 al: P.Giacinto Jacobitti
Ekde nun novaj abonoj validos ankaŭ por la tuta jaro 1972.

ooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo